**La babiladaj rondoj** **okazas vendrede je la 19a horo.** La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (**ĉef**manĝon kaj deserton). La invititoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens, la gastiganto preparas terpomojn kaj deserton. La gastoj alportas fromaĝojn, trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. La salono estas pagata el la kaso.

**Ambaŭgrupa babilada rondo:** okazos la 14-an de septembro (anstataŭ *Espace Dickens*), vendrede, ĉe Marie-Antoinette kaj Knud Sunier, av. des Alpes 150 en Montreux, 021 961 38 56

## "Okcidenta grupo":

**Ve, la 21-an de septembro**

ĉe Monika Golaz kaj Giulio Grigoletto
r. de l'Ecole de Commerce 3, Lausanne
079 754 21 60

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

## "Orienta grupo":

**Ve, la 12-an de oktobro**

**kiu gastigos nin?**

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**La Magia Lando:** Di, la 26-an de aŭgusto, ekde la 11-a, LES invitos vin al rakledo en la kabaneto de Sauvabelin, route de la clochatte 2. Tie ni filmos la lastajn scenojn de nia filmo. Aliĝu al **francisko@eo-l.ch** por ricevi detalojn.


## Laŭzana Esperanto – Societo

ĉe F. Randin – ch. de Vallombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
https://www.facebook.com/esperantolausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 369 29 17 –Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

septembro 2018 – n° 07

Kunsidoj normale okazas ĉiumonate
ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Lausanne

Lunde, la 3-an de septembro je la 20-a

## Charlotte klarigos al ni pri "siaj aventuroj"


Venu multnombrajn aŭskulti nian vicprezidantinon rakonti al ni "apudmorte vojaĝon miraklan".

Lunde, la 1-an de oktobro
- Decidota

Lunde, la 5-an de novembro
- Decidota

Sabate, la 15-an de decembro
- Zamenhofa festo (informoj sekvos en venonta informilo)

*La aŭtentika amiko estas tiu,*
*kiu alvenas,*
*kiam la aliaj foriras.*



*Alban Goodier (1869-1939)*

# Ekskurso 2018 en Morges

Tradicie, la Laŭzana Esperanto-Societo proponas al siaj membroj vizittagon en Romandio. Ĉijare, sabate, la 23-an de junio, 18 partoprenantoj jese respondis al la ideo de Cléa – la organizantino de la vizito.



La piloto de la turisma urba trajneto atendis nin apud la stacidomo de Morges. La lokomotivo nomiĝas Guillaume, nomo donita pro juna handikapulo. Post promenado laŭ la lago kaj tra la vinberejo, nia ŝoforo Daniel, frato de Cléa, kondukis nin al la *Domo de la Rivero*.

Tiu muzeo, kreita en 2007, dank'al la kunlaboro de la *Universitato de Laŭzano* (UNIL), de la *Alta Lernejo de Pejzaĝo, de Inĝenierio kaj de Arkitekturo de Ĝenevo* (HEPIA) kaj de la *Asocio Truto-Léman* (ATL), celas studi kaj valorigi la akvajn mediojn de la regiono kaj la indiĝenajn specojn, kiuj troviĝas ene. Nia gvidisto detalis por ni la svisromandian ekosistemon de post milionoj da jaroj ĝis niaj tagoj. Ni povis observi la tipan faŭnon regionan, kiel pajloŝtopitajn birdojn kaj mamulojn, ĉefe tiuj, kiuj vivas laŭ la rivero *Boiron*, kiu fluas flanke de la muzeo.

Surprizo atendis nin en speciala halo: la submarŝipo F.A. Forel, uzita de Jacques Piccard (la patro de Bertrand kaj filo de Auguste) por studi la sublagan vivon, speciale en la lago Léman kaj en Mediteraneo.



Ni povis observi testudojn, ezokojn, silurojn kaj eŭropajn perkojn en akvarioj integritaj al la rivero, same kiel en didaktita lageto kaj nestoj.






Nia "trajna ŝoforo" atendis nin kaj allagborden kondukis ĉiujn ĝis la kampadeja restoracio "La Veranda", kie rezervita manĝo estis bone meritita. Aperitive, ni festis la revenon - la reviviĝon ! - de Charlotte kaj la naskiĝdatrevenon de Monique per ŝaŭmvino.

Rosario Scopelliti

☆

## Ĉu vi ŝatas matematikon ?

Matematiko povas definiĝi kiel sciado, en kiu oni scias nek de kiu oni parolas, nek ĉu tio, kion oni diras, estas vera.

*Bertrand Russel, matematikisto (1872 – 1970)*

## Kaj ĉu vi ŝatas la diron de la financistaro ?

Se vi komprenis ĉion, kion mi ĵus diris al vi, estas, ke mi eraris ie.

*Alen Greenspan, prezidinto de la Usona Federacia Rezervejo*

**Alvoko:** La redaktoro de tiu gazeto ĉesos sian dungon ĉijarfine. Tiuj, kiuj bondeziras daŭrigi tiun komision, bonvolu anonci sin al nia sekretario.

Antaŭdankojn. KS.